

& Anĉar':

< Rekante 17 el 35 batoj por strofo, entute 315 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Aleksandr Puŝkin (1828). El rusa tradukis (2000) Sergej Rublov. Baladigis (2015) Martin Strid per sveda marŝmelodio kaj nova rekantaĵo. Klarigoj (*): '1 Anĉaro, speco de morusaco, latine *Antiaris Toxicaria*.>

(#Melodio:

<:35> (

a;Mi /LaTiLaSi LaTi do oo;milre TiSo TiSo Tire La La;do mifimire mifi so oo;tilla fire fire fila mi mii;dore mila laltilaso lalso mi3;fi somi fire mi mi3;La re3fi laso fi mi;re diLa TiSo La La

)x9)+

(&Strofoj:

'1 De/zerte, en senviva spac', ; su2r arda kaj varmega tero ; terure staras kun minac' ; a2nĉaro*, arbo de sufero.

(×: **Nun aŭskultu je2nan rako2nton ; dum danco tondre bruas ; la ĉeno estas ponto ; ni ĉiun paŝon ĝuas.**)

'2 Naturo de soifa step' ; ĝin naskis en kolera horo, ; veneno en fluanta streb' ; plenigis arbon per doloro.

'3 Kaj gutas la venen' al ter' ; dum ardas de tagmezo flamo, ; ĝis la alveno de vesper' ; ĝi solidiĝas je balzamo.

'4 Ne flugas bird' al tiu lok', ; ne venas besto pro teruro, ; nur nigra vento kun sufok' ; impete blovas en obskuro.

'5 Kaj kiam nubo per torent' ; akvumas arbon de la morto, ; disfluas akvo en moment' ; jam plena de venena forto.

'6 Sed sendis hom' al tiu lok' ; alian homon por veneno. ; Foriris li laŭ reĝa vok' ; ĝis la alveno de mateno.

'7 Kaj venis li kun la venen', ; prenita de la arbo morta, ; kun frunto ŝvita, en ĉagren', ; konfuzoplena kaj senvorta.

'8 En tendo reĝa kun sindon' ; li kuŝis pala kaj mizera, ; kaj mortis sklavo apud tron' ; de potenculo plej severa.

'9 Kaj dume sagojn por milit' ; venenis reĝ' kun ruza celo, ; al fremda tero sen hezit' ; li sendis morton en kruelo.)